

ANIM' KAJ KORO

S. D'Esposito – T. Manlio

Esperantigo: Emanuele Rovere

Mi riskas perdi pacon, dormon ĉar vi koleras sen kialo.

Ĉu veras, ke nun viaj lipoj ne volas kisojn plu?

Vi ne respondas miajn vokojn nur por iriti min.

Kunestu tiel ni “anim' kaj koro” kaj ne disiĝu eĉ dum unu horo.

Dezira mia al vi min turmentegas: resti kun vi por vivi en fabela rev'.

Amarajn vortojn ni neniam diru. Feliĉo povas flori per unu spiro.

Se ankaŭ vi avidas al nia amo, ni ĉiam restu tiel “anim' kaj koro”.

Mirinde estas senti, ke vi min amas kaj vidi, ke vi tiom sopiras al mi.

Dolĉege estas havi vin ĉi-apude, kun via spiro kvazaŭ kareso sur mia haŭt'.

Belege estas aŭdi vin, kiam vi ridas: l'animon mian tio plenigas per ĝoj'.

Por kunparigi l'vivon kun vi por ĉiam, mirinde estas senti, ke vi estas mia.

Vi estas mia!